



Go-Amiko

**Informilo de
Japana Esperantista Go-Asocio
N-ro 177, Aŭgusto 2026**



Venkis s-ro Hori en maja kunsido



S-roj Iŝino, Kinoŝita (tria loko), Hori, Sakurai (dua loko) kaj Mori

JEGA 春の囲碁大会の報告

日時： 2026 年 5 月16 日(土) 10:30~16:00

場所： 大崎囲碁クラブ (電話 03-3491-1349)

これまで 5 月の囲碁大会は、ハケ岳エスペラント館で、宿泊で行われてきましたが、状況の変化で、東京の大崎囲碁クラブで日帰りで行うことにしました。今回は 5 人の参加でした。

La printempa Go-konkurso de JEGA

Ni okazigis la printempan Go-konkurson de JEGA jene :

Dato : la 16an de majo 2026 ekde la 10 :30 ĝis la 16a

Loko : Go-klubo de Oosaki (tel : 03-3491-1349)

Kutime nia maja kunsido okazis en Esperanto-Domo de Jacugatake en Jamanaŝi dum du tagoj, sed pro la nunaj kondiĉoj de la partoprenantoj ni okazigis ĝin en Tokio en unu tago. Ĉi-foje 5 homoj partoprenis. La ĉampiono estis s-ro Hori Jasuo kun 3 venkoj kaj 1 malvenko.



Gaje ludis la kvin Go-istoj.

Perfekta venko de Hori (4-danano) kontraŭ s-ro Sakurai (7-danano). Sakurai (blanko) perdis grandan ŝtonaron.



Facilaj ‘Esencaj Metoj’ de Majstro SAKATA (3)

- almenaŭ tiujn vi sciu -


Aŭtoro originala japane:

s-ro SAKATA Eio, honor-HON'INBOU-titolulo

Eldonita originale japane de: KIEN-TOŜO, Tokio, Japanujo

Ĉapitro 1. ‘Sin-ligoj’ (daŭrigo 2)

Nun ni plu studu pli altnivelajn rimedojn ol ‘solida sinligo’ aŭ ‘diagonalaj sinligoj’, por sinligi.



Diag. 20

SupraDekstra angulo;


Por Nigro sinligi la ‘tranĉiĝeblan punkton ‘a’, eblas ‘solida sinligo N-a’, kaj ‘diagonalaj sinligoj’ N-b aŭ N-c. Tamen oni povas elekti pli efikan rimedon.

MalSupraMalDekstra angulo;


Ĉi tiu ŝtonmeto estas la N1, kiu nomiĝas ‘ĉevala sinligo (ĉevale sinligi)’. La nomo devenis de la rilato inter la ŝtonoj N1 kaj ▲. Se


Blanko tranĉas per B-a, Nigro povas kapti ĝin en la formo de ‘ŝtuparo’. Ek de N-b aŭ N-c.

La problemo 303-a
Nigro havas meton.



La problemo 304-a
Nigro havas meton.






Diag. 21

SupraDekstra angulo;

N-1 estas 'ĉevala sinligo'. Ĉar la nigra ĉirkaŭanta ŝtongrupo estas forta, se Nigro povas gardi la 'tranĉiĝeblan punkton' 'a', pli bone estas ĉi tiel disvastiĝi centren ol koaguliĝi per 'solida' aŭ 'diagonala' 'sinligo'.

MalSupraMalDekstra angulo;

Oni povas kompreni, ke B-1 estas 'ĉevala sinligo', se antaŭvidi interŝanĝon de la ŝtonmetoj B-b kaj N-c. Blanko intencas ke lasi la nigran ŝtongrupon malalte koaguli, kaj rapide disvastiĝi blankan ŝtonon centren.



Diag. 22

Nun ni studu pri 'ĉevala sinligo', kiu aperas en 'batal-modelo' kontraŭ 'granda-alta-stelo'.

SupraDekstra angulo;


La N-1 nomiĝas 'granda-alta-stelo'. Blanko 'ekbatalas' de B2, kaj ekzemple procedas kiel montrite.

Pri N11, malgraŭ ke nigra ŝtono N3 nepre estos forkaptita de Blanko, sed Nigro ĉiukaze devas

plimultiĝi la oferon al 2 ŝtonoj per N11, utiligante la oferton.

MalSupraMalDekstra angulo;

Sekvante, Nigro povas ambaŭflanke efikigi per N1 kaj per N3, N5. Kaj Nigro finu per 'ĉevala sinligo' N-7. Nigro estas kontenta pri ĉi tiu rezulto, gajnante fortan 'potencon' ambaŭflanke.



Diag. 23


SupraDekstra angulo;

Ekde la formo en la SupraDekstra angulo en lasta diagramo, estas alia rimedo, ke ek de 'tranĉo' N1, plimultigante unu oferatan ŝtonon, perfekte 'premsufokas' la blankan ŝtonaron. Tamen en ĉi tiu kazo, Nigro devas fini per 'solida sinligo', N11.

MalSupraMalDekstra angulo;

Se Nigro elektus 'ĉevalan sinligon', N-1, iam poste Blanko 'tranĉos' per B2, kaj Nigro suferos pri la kontraŭrimedo.

Oni devas uzi 'esencajn metojn', pensante ĉu ĝi estas adaptebla aŭ ne.



Diag. 24

SupraDekstra angulo;

Ĉi tiu formo estas unu vario el 'batalmodeloj de alta-stelo'.

La ŝtonmeton N1 oni povas taksi plej altnivela 'ĉevala sinligo'. Per ĉi tiu meto Nigro povas


- singardi kontraŭ Blanka tranĉo B-a, kaj

- celi poste tuŝmeti kiel N-a.

Jene klarigas en la ordo. Unue kontraŭ B-a,...

MalSupraMalDekstra angulo;

En la procedo el de N2 ĝis N8, Nigro povas premsufoki la blankan ŝtonaron. Blanko gajnis nur unu ŝtonon, kaj la spuro de la forkapto estas 'falsa okulo'. Dume Nigro faris fortan potencon. Blanko malbone falis en Nigran ruzon.



Diag. 25

SupraDekstra angulo;


La alia efiko de ▲ aperas, kia, Nigro tuŝmetas kiel N1, celante bloki la blankan ŝtongrupon de la Dekstra rando. Kiam Blanko celas kontraŭatakon kaj kolizias kiel B2, kaj Nigro blokas per N3, Blanko ne povas tranĉi per B-a, ĉar ▲ sidas la pozicio kiel 'ĉevala sinligo'. Nigro povos kapti la tranĉanton per 'ŝtuparo' ek de N-b. Eĉ se la 'ŝtuparo' estas avantaĝa

por Blanko, kaj Blanko povas eskapi kiel B-c, laŭ la procedo N-d, B-e, N-f, Nigro faros fortan potencon ekstere.

MalSupraMalDekstra angulo;

Konklude Blanko devus retiri kiel B-2, kaj Nigro faros bonformon kiel N3.

{Noto de tradukanto;




Diag. 25t

Blanka 'el-bato' B2 estas malavantaĝa aŭ danĝera por amatoroj, ĉar Nigro 'tranĉos' per N3. Se Blanko savante la B2 ŝtonon kapti N3 per B4, Nigro minacos per N5 kaj sinligas per N7. Ĉi tiam la blankaj ŝtongrupoj estas disigitaj. }

Diag. 26 (Vidu la sekvantan paĝon)

SupraDekstra angulo;

Kiam Blanko ligas la du ŝtonojn ▲, 'solida sinligo' B-a estas 'stulta formo' kaj ne estas efika. Aŭ se Blanko elektas 'diagonalan sinligon'



B-b, Nigro ‘diagonale tuŝmetos’ kiel N-c, kaj Blanko devos retiri kiel B-b, do la situacio ne pliboniĝas.

MalSupraDekstra angulo;

Ĝuste estas singardi kontraŭ Blanka tranĉo, per ‘saluto’ B1. Ĉi tiu meto devas esti unu vario de ‘sinligo’, sed ne havas definitan terminon. Apartenas al familio de ‘ĉevala sinligo’, estas unu el memorindaj artoj.

MalSupraMalDekstra angulo;

La N-1 estas la sama rimedo por ‘sinligi’, kun diferenco de la direkto.

Jene resumas la rimedojn por ‘sinligi.’ Ili kategoriĝas kiel jene;

1. Solda sinligo
2. Diagonala sinligo
3. Ĉevala sinligo, ktp.

La plej certa estas ‘solida sinligo’, ŝtonmeto sur la tranĉiĝeblan punkton. Ĉi tio estas baza. Oni povas difini, ke en ‘diagonala sinligo’ oni utiligas la regulon de ‘forkapto’ kaj la situacio de ‘minaco’, kaj, ke en ‘ĉevala sinligo’ oni utilas la tekniko de ‘ŝtuparo’. Oni devas elekti la rimedon por ‘sinligi’ laŭ la situacio. Sed unue pripensu pri ‘solida sinligo’. Kaj due komparu la rezultajn formojn de ‘diagonala sinligo’ aŭ ‘ĉevala sinligo’. Se malprudente elektus adaptitan rimedon, restus posta damaĝon {kiel ‘kompenĉejo por alternekaptado’, ktp.}.

Krome estas alia tekniko ‘bambua sinligo’, kompreneble en ĉi tiu tekniko oni utiligas la regulo de ‘alterna ŝtonmeto’. La certeco estas preskaŭ sama al ‘solida sinligo’ sed strikte, ‘bambua sinligo’ estas iom malpli certa ol ‘solida sinligo’ {en la kazo de ‘lavanĝo-kapto’ aŭ kiel ‘kompenĉejo por alternekaptado’}.

Finaj vortoj de ĉi tiu ĉapitro: “Unue pripensu pri ‘solida sinligo’!”

(daŭrigota)

La solvo 303-a

Nigro povas mortigi la blankon.

Fig. 1-a: Sukceso. ‘Internen meti’ N1 estas bone kuraĝe irante profunden. Kontraŭ N3 estas bona antaŭvidante sekvantan N5. Anstataŭ B2, se Blanko respondas per B-a, Nigo mortigos la blankon per N-b.

Fig. 2-a: Malsukceso. Per la ‘suben-iro’ N1, Blanko povas facile sin vivigi per B2. Alternativaj estas B4 kaj la ‘diagonala sinligo’ supren de N3.




Fig. 1-a




Fig. 2-a

La solvo 304-a

Nigro povas sinviviĝi.

Fig. 1-a: Sukceso. ‘Rektangliĝi’ N1 estas bone evitante blankan ‘internen-meton’. Kontraŭ B2, Nigro ŝtonmetu N3, kaj alternativaj estas la punktoj 4 kaj 5.

Fig. 2-a: Malsukceso. Kontraŭ ŝajne natura N1, bone por Blanko estas B2 kaj laŭ la procedo ĝis B8, la nigro mortiĝas. Rimarku, ke Nigro devos sinligi sur la tranĉeblan punkton, malsupren de B2, kaj la formo fariĝos ‘interna triopo’.




Fig. 1-a




Fig. 2-a

(cititaj el ĵurnalo “ASAHI SINBUN”)

漆の碁笥に 350 万円の値段が

7 月 7 日の東京テレビの夜の番組「開運お宝鑑定団」に、人間国宝の音丸耕堂(1898－1997)の漆器の碁笥が鑑定に出されました。出した人は原孝之さんという囲碁好きで、インターネットオークションで 30 万円で落札しました。本人の評価額は 100 万円でしたが、鑑定結果はなんと 350 万円でした。

Lakitaj go-ŝtonujoj estis taksitaj je 3.5 milionoj da enoj.

La 7-an de julio, lakitaj go-ŝtonujoj faritaj de la Vivanta Nacia Trezoro Otomaru Koodoo (1898-1997, foto dekstra) estis prezentitaj en la vespera programo "Kiom taksi antikvaĵojn" de Tokio-TV. La persono, kiu prezentis ĝin, estis go-entuziasmulo nomita Hara Takajuki, kiu gajnis ilin en reta aŭkcio kontraŭ 300 000 enoj. Lia mem taksita valoro estis 1 miliono da enoj, sed la taksorezulto estis ŝokige 3.5 milionoj da enoj (20 000 eŭroj).



一般語彙になった囲碁用語（２）

「ダメ」「ダメ押し」の語源は囲碁

日常で使っている「これはダメだよ」という時のダメは、囲碁の「駄目」からきています。「駄目」＝「打っても陣地の増減に関係のないところ」です。そこから、日常会話の中でも「それはダメだ」みたいな使われ方をするようになったのです。

「駄目押し」は、既に確かだと分かっていることを、さらに念入りに確認することで、2つの意味があります。1つは「既に確かだと分かっていることを、さらに念入りに確認すること」。もう1つは「勝負がほぼ決した後に、さらに決定打を加えて勝利を確実にすること」です。囲碁では勝負がついた後、「駄目」と呼ばれる部分に石を置く行為を「駄目押し」と言います。

野球中継の解説で、「中押(なかおし)し点が入った」などという言葉が出てくることがあります。この場合は、「勝利を確実にする得点」という意味で使われますが、囲碁用語の「中押(ちゅうおし)し」(獲得した地の目数を数えないで、「負けが確実なので、ここで負けを宣言します」)から来た誤用でしょう。

Go-terminoj kiuj estas uzataj en ĉiutaga vivo (2) "Dame" kaj "Dame-oŝi"

La originoj de "dame" kaj "dame-oŝi" kuŝas en Go.

"Dame" uzata en ĉiutaga konversacio, kiel en "Ĉi tio ne taŭgas", devenas de la Go-termino "dame". "Dame" signifas "loko kie meti ŝtonon ne influas la pligrandigon aŭ malpligrandigon de teritorio." De tie, ĝi ekestis uzata en ĉiutaga konversacio kiel en "Tio ne taŭgas".

La vorto "Dame-oŝi" (puŝi *dame-on*) estas uzata por konfirmi ion, kio jam estas certa, kun eĉ pli da zorgo. "Dame-oŝi" havas du ĉefajn signifojn. Unu estas "konfirmi ion, kio jam estas certa, kun eĉ pli da zorgo." La alia estas "aldoni decidan movon por certigi venkon post kiam la ludo preskaŭ estas decidita."

En Go, post kiam la ludo finiĝis, la ago meti ŝtonon en lokon nomatan "dame" nomiĝas "dame-oŝi".

日本棋院の苦境 囲碁界は立ち直れるか

囲碁界の総本山・日本棋院が、深刻な経営難に直面している。拠点とする東京本院会館ビル（東京都）の売却移転案まで浮上している。

囲碁を楽しむ人の数が減っていることが痛手となっている。総務省の「社会生活基本調査結果」によると、過去1年間に囲碁をした人は2006年に約204万人だったが、2021年は約104万人と半減。将棋が2006年に約441万人、2021年は約337万人と約24%の減にとどまったのに比べ、囲碁は人数自体も減少の割合も厳しい。

当然、棋院の収入も減った。個人や法人の会員からの会費をはじめ、棋戦や大会、講習会など各種事業の収入、寄付金などを合わせた棋院の経常収益は、「30年前の半分」という落ち込みだ。



囲碁界は2000年代初頭に人気マンガ「ヒカルノ碁」でブームに沸いたが、長続きしなかった。2010年代後半からは将棋界が「藤井聡太ブーム」で未曾有の活況を呈するのを横目に、囲碁の人気は低迷が続いてきた。だが近年は、一力遼四冠(28)が主要な国際棋戦で優勝するなど日本勢の復調も目覚ましい。この勢いを、囲碁への関心の高まりにつなげたいものである。

エスペラント囲碁界も、30年前には、日本棋院の広間を借りて囲碁大会を開いていたというが、今では、6人を集めるのも難しくなっている。エスペラント界自身も人数が減っているし、若い世代に普及をしたいが、囲碁の難しさもあり、なかなかうまく行かない。でも何か工夫をしたいものである。

堀泰雄

Krizo de la Japana Go-Asocio: Ĉu la Go-Mondo Povas Restariĝi?

La Japana Go-Asocio, la ĉefsidejo de la Go-mondo, alfrontas gravajn financajn malfacilaĵojn. Eĉ ekzistas plano vendi kaj translokigi sian ĉefsidejon en Tokio.

La malkresko en la nombro da homoj ĝuantaj Go-on estas grava bato.

Laŭ la "Enketaj Rezultoj pri Tempo-Uzo kaj Libertempaj Agadoj", la nombro da homoj, kiuj ludis Go-on, estis proksimume 2.04 milionoj en 2006, sed duoniĝis al proksimume 1.04 milionoj en 2021. Kompare kun Ŝogio, kiu vidis relative malgrandan malkreskon de ĉirkaŭ 24% (proksimume 4.41 milionoj da ludantoj en 2006 al 3.37 milionoj en 2021), la malkresko de Go kaj laŭ la nombro da ludantoj kaj laŭ la malkresko-rapideco estas severa.

Kompreneble, ankaŭ la enspezoj de la asocio malpliĝis. La funkciaj enspezoj de la asocio, kiuj inkluzivas kotizojn de individuaj kaj entreprenaj membroj, enspezojn de diversaj agadoj kiel turniroj kaj konkursoj kaj donacojn, estas "duono de tio, kio ĝi estis antaŭ 30 jaroj".

La mondo de Go spertis ekprosperon komence de la 2000-aj jaroj per la populara mangao "Hikaru no Go", sed tio ne daŭris. Dum la mondo de ŝogio spertis senprecedencan ekprosperon danke al la "Soota Fujii-ekprospero" fine de la 2010-aj jaroj, la populareco de Go daŭre malpliĝis. Tamen, en la lastaj jaroj, japanaj ludantoj montris rimarkindan revigliĝon, kun Ichiriki Rjoo (28), posedanto de kvar titoloj, venkante en gravaj internaciaj turniroj. Estus dezirinde profiti de ĉi tiu impeto kaj pliigi intereson pri Go.

Antaŭ 30 jaroj la Japana Esperantista Go-Asocio kutimis okazigi Go-turnirojn en la halo de la Japana Go-Asocio, sed nun estas malfacile eĉ kunvenigi ses homojn. Ankaŭ la esperanta komunumo mem vidas malpliĝon de membroj. Kvankam ni volas popularigi Go-on inter pli junaj generacioj, la malfacileco de Go-ludo igas tion malfacila. Tamen, ni volas trovi iun rimedon por prosperigi Go-on inter esperantistoj.

—○—●—○—●—○—●—○—●—○—●—○—●—○—●—○—●—○—●—○—●—○

Japana Esperantista Go-Asocio (JEGA) 日本エスペランチスト囲碁協会

Esperantista Go-Ligo Internacia (EGLI) 世界エスペランチスト囲碁協会

UEA-konto: egli-f Retejo : <http://jega.shisyou.com/jega/index.html>

Adreso : 2-13-3 Ootone, Maebaŝi, Gunma, Japanio, 371-0825, Japanio

Ĉe HORI Jasuo 3 7 1 - 0 8 2 5 群馬県前橋市大利根町 2 - 1 3 - 3 堀泰雄方

retadreso: horizonto@r.water.sannet.ne.jp 電話 : 027-253-2524

Ĝirkonto: 郵便振替口座 00170-4-84859 日本エスペランチスト囲碁協会

525-0041 滋賀県草津市青地町 960-8 森均方